N. N. 11,

# Vaga kanto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. L'antaŭtagmezon tutan mi
Studadis kun fervor',
Nun posttagmezon ĝojos en
Bierejo mia kor'!
Pli frue mi ne lasos ĝin,
Ol vokis la meznokto min.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

2. De l'viv' plej granda ĝojo jen
Do estas am' kaj vin',
De l'amatino ĉirkaŭpren'
Sentigas princo min!
Kaj ĉe hordea suko eĉ
Mi revas laŭ kronita reĝ'!
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

3. Ja homo sen de am' inklin'
Nek vinon amantul'
Neniam amikigos min
Nek estos ajn karul'.
Similas vivo tia nur
Malbonan kampon sen kultur'!
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

...

N. N. 11,

# Studenta kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La tutan tagon studis mi
Senpaŭze ĝis vesper'.
Nun dediĉita estu ĝi
Finfine al bier'.
Nur volas iri hejmen mi,
se sonas de l' gardisto kri'.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

2. Plej bela aĵ' en mondo ĉi
Ja estas am' kaj vin',
Brakumas mian inon mi
Kaj sentas princo min.
Mi revas, ke kun reĝa kron'
Mi sidas alte sur la tron'.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

3. Se hom' ne sentas ĉarmon de
La bel' kaj de la vin',
Na ŝatas tiun mi kaj ne
Salutas kore lin.
Egala ŝajnas tiu ĉi
Al malfekunda kamp' al mi.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

...

N. N. 11,

# Studentenlied

1. Ich hab' den ganzen Vormittag,
In einem fort studiert
Drum sei nun auch der Nachmittag
Dem Bierstoff dediziert.
Ich geh, nicht eh'r vom Platze heim,
Als bis die Wächter zwölfe schrei'n.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

2. Was ist des Lebens höchste Lust?
Die Liebe und der Wein!
Wenn's Liebchen ruht an meiner Brust,
Dünk ich mir Fürst zu sein;
Und bei dem edlen Gerstensaft
Träum ich von Kron' und Kaiserschaft.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

3. Wer nie der Schönheit Reiz empfand,
Wer sich nicht freut beim Wein,
Dem reich' ich nicht als Freund die Hand,
Mag nicht sein Bruder sein.
Sein Leben gleicht, wie mir es dünkt,
Dem Felde, das nur Dornen bringt.
Vivállerallál-lerálleralla,
Vivállerallálleralla!

...

4. Jam ofte pensis mi, pro ĉiel'!
Ke de l'Kreinto do
Pri soifo estas la kamel'
Tre favorata, ho!
Barelon kiel ventro ĝi
Enhavas per naturmagi'!
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

5. Ĉu - kien mia - scias vi -
Kompreno iris for?
Ebrie sentas preskaŭ mi,
Batadas mia kor'.
Okulo surda, muta naz',
Senvida lango - stranga kaz'!
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

6. Ho, mastro, unu glason nur,
Enverŝu sen envi'!
La ŝuldon skribu al la mur',
Jen mia garanti':
Por la pruntita biero ĉi
Prezentas mian ĉapon mi!
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

...

4. Jam ofte mi - ĉe la ĉiel' -
Pensadis pri l' kamel':
Komforton havas tiu ĉi;
Ĉar portos ĝi en si
Barelon, se ne akvo en
Ĉi tiu estus jen.
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

5. Ho, karaj fratoj, estas ne
Plu klara pens' en mi;
Mi havas la impreson, ke
forlasis min raci'.
Tordiĝas miaj sensoj kvin
Kaj tio konfuzigas min.
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

6. Plenigu por mi drinkemul'
La glason ree vi!
Ĝin notu, mastro, sur tabul',
Pruntita estu ĝi.
Mi lasas mian ĉapon kun
promes' de posta pago nun.[3]
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

...

4. Schon oft hab' ich bei meiner Seel',
Darüber nachgedacht,
Wie gut's der Schöpfer dem Kamel
Und wie bequem gemacht:
Es trägt ein Fass im Leib daher,
Wenn nur kein Wasser drinnen wär!
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

5. Ihr lieben Brüder, sagt mir doch,
Wo der Verstand mir weilt;
Es kommt mir vor in meinem Sinn,
Als wär' ich fast bekeilt;
Das Auge lallt, die Nas ist schwer,
Und meine Zunge sieht nicht mehr.
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

6. Herr Wirt, nehm' er das Glas zur Hand
Und schenk' es wieder ein!
Schreib' er's nur dort an jene Wand,
Gepumpet muß es sein.
Sei er fidel, ich lass' ihm ja
Mein Cerevis zum Pfande da.[4]
Vivállerallál-lerállerallá,
Vivállerallállerallá!

...

---

[3] aŭ:
Kaj prenu mian ĉapon ĉi,
Ĝi estu via garanti'

[4] Das Cerevis - abgeleitet von dem vulgärlateinichen Wort "cerevisia" für Bier - ist der Bierhut der Studenten.

*Traduko de la Germana poemo “Studentenlied” de N. N. 11 en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-389-766 (2007-03-18 11:59:11)*

*La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoroFrank Petersohn* `http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html`*. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ:* `http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284`*. La esperantigon mi trovis en la kant-libreto “Esperantista kantaro”, kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44. (Sur la paĝoj 9 kaj 10 de tiu kant-libreto estas intershanĝitaj la strofoj 3 kaj 4, kompare al la origina germana teksto. Mi re-interŝanĝis tiujn.) La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.*

*Traduko de la Germana poemo “Studentenlied” de N. N. 11 en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2007-03-20.*

*Arg-389-767 (2007-03-23 11:43:37)*

*La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoroFrank Petersohn* `http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html`*. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ:* `http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284`*. La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 11.*

*Arg-389-765 (2007-03-18 12:09:45)*

*Den Text dieses Liedes habe ich, Manfred Retzlaff, entnommen aus der Internetzseite von Herrn Frank Petersohn* `http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html`*. Dort ist angegeben, dass die 2. und die dritte Strophe von Joachim Perinet (1765-1816) vor 1794 verfasst worden sind. Siehe auch:* `http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284`*. Die Melodie des Liedes ist in beiden Netzauftritten in Form einer Midi-Datei angegeben.*